MONA

# Ni Semas Esperanton

## Sesmonata Bulteno

Junio 2018 n-ro: 3



Karaj legantoj de ĉi tiu bulteno,

ni faras multon sed ni devas fari multon plian. Mi volas diri, ke ni provas akiri rezultojn por Esperanto en pluraj landoj de Norda Afriko, de la Meza Oriento kaj de Kartvelujo kaj Armenujo, sed ke la konkretaj pozitivaj rezultoj estas videblaj nur en kelkaj el niaj landoj.

Certe estas bonnivela agado en Turkujo kaj en Israelo, sed malgraŭ ĉiu klopodo tre malmulta agado en arablingvaj landoj kaj en Kartvelujo, kie neniu volas aŭ povas decide kaj daŭre okupiĝi pri organizado de la landaj esperantistoj. La ekzemplo de Maroko estas klara. Ja ekzistas esperantistoj en Maroko sed ne ekzistas iu centra motoro, kiu povas fari la bazan laboron registri la adresojn de la marokaj esperantistoj, proponi al ili materialon en la araba por informi pri Esperanto kaj por lerni Esperanton, aranĝi kunvenon por marokaj esperantistoj, ktp. Ankoraŭ pli stranga estas la stuacio en Armenujo, kie tamen ekzistas bona Esperanto-Asocio. Paroli al la armenoj en la armena pri la belecoj de Esperanto estas pli esence ol nur paroli al la esperantistoj pri la belecoj de Armenujo.

Nun ni provas per aranĝado de Mezorienta Kunveno en Irano eltiri irananojn el ilia izoleco. Samtempe ni provas per ĉefe turisma kunveno en Akabo, kunligita kun la israela kongreso, vidi ĉu io povas (re-)naskiĝi en Jordanio.

Restas nur unu lando tute blanka en nia mapo: Sudano. Se iu havas kontaktojn tie, li aŭ ŝi bonvolu informi pri tio. Bonvolu memori pri nia ĉefa informpaĝo en la araba: **www.esperanto.net/ar/** kaj memorigi pri ĝi en arablingvaj retejoj.

Amike,
**Renato Corsetti**



## Aperis la dua MONA Bulteno

En januaro 2018 aperis la dua numero de MONA Bulteno, kiu estas kolekto de artikoloj pri agadoj jam aperigintaj en la MONA retejo. La Bulteno troviĝas sub menuo "MONA Bulteno" en nia retejo.

Jen la ligilo de nia retejo. Ne forgesu ke vi povas aboni al ĝi libere lasante vian retpoŝtadreson. Por tio bonvolu iru al la dekstra flanko de la retpaĝo.

**https://monainformado.wordpress.com/**







## Senprecedenca reklamado por Esperanto-kurso en Tel-Avivo (8/3/2018)

**Senprecedenca reklamado por Esperanto-kurso en Tel-Avivo**

Venontsemajne, la 12.3, komenciĝos post la Tel-Aviva klubkunveno E-kurso instruota de d-ro Doron Modan. En la lunda kunsido la estraro aprobis duonpaĝan anoncon en la kultura semajnfina suplemento de la gazeto "Haaretz" (aldone). Tio aldoniĝas al centoj da stratanoncoj en Tel-Avivo kaj apudaj urboj (ambaŭ gviditaj de Doron), kaj al reklamkampanjo en Facebook (farita de Amri), kiu ĝis nun, en tri (el 8) tagoj atingis 3500 personojn kaj 450 reagojn. La suma reklambuĝeto estas ĉ. 2000 eŭroj. Ni sekvos la originon de ĉiuj telefonaj reagoj, por sekve lerni la koston kaj efikecon de ĉiu reklamkanalo.

Amike,
Amri Wandel
Prezidanto de ELI

**פירסום הקורס לאספרנטו הנפתח בשבוע הבא**

שלום חברים,
בשבוע הבא יחל, אחרי מפגש המועדון, קורס אספרנטו בן 15 שעורים אותו ינחה ד"ר דורון מודן. בישיבת ההנהלה ביום שני אושרה מודעה של חצי עמוד במוסף התרבות "גלריה" של עיתון "הארץ" (מצורפת). המודעה מצטרפת אל שני ערוצי הפרסום האחרים – מאות מודעות שהודבקו על לוחות מודעות עירוניים בת"א ובערים הסמוכות בהובלת דורון, ופרסום ממומן בפייסבוק (בהובלתי), שעד כה הניב תוך 3(מתוך 8) ימים 3500 צפיות ו-450 תגובות. עלות הפרסום הכוללת היא כ-9,000 ש"ח. זהו בו בזמן גם פרסום של אספרנטו. מעקב אחרי הפניות הטלפוניות יראה את הפילוח לפי ערוצי הפרסום ואת היעילות לעומת מחיר של כל אחד.
עמרי



## Arablingva retejo pri Esperanto (8/3/2018)

**Arablingva retejo pri Esperanto**

Danke al la laboro de Emilio Cid, estrarano pri informado de UEA, kaj al la laboro de juna siria esperantisto, Taled Orabi, ni, la komisiono de UEA pri agado en la landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko, disponas pri la arablingva versio de la paĝaro

www.esperanto.net:
http://esperanto.net/ar/

Vi povas kompreni la grandan antaŭensalton rilate al nia kutima paĝareto.

Dankon, UEA!
**Renato**

**موقع الإسبرانتو باللغة العربية**


بفضل جهود إيميليو سيد، عضو مجلس المنظمة العالمية للإسبرانتو المختص بالإعلام، والإسبرانتي السوري الشاب طالب عرابي، قمنا نحنُ مفوضية المنظمة العالمية للإسبرانتو للشرق الأوسط وشمال أفريقيا بتوفير النسخة العربية من موقع

www.esperanto.net
http://esperanto.net/ar/

ويمكنكم أن تلاحظوا هذا التطور الكبير بالمقارنة بموقعنا الصغير المعتاد.

مع جزيل شكري للمنظمة العالمية للإسبرانتو!

ريناتو



## Esperanto Kurso en Lernejo (8/3/2018)

**Kozmos Yazılım Lisesinde Esperanto Kursu**

27 Aralık 2017 günü Avcılar Kozmos Yazılım Lisesinde yapılan Esperanto tanıtım seminerinden sonra bu sefer Şubat ayı içerisinde dört saat Esperanto Kursu verildi. Kurs'ta dilin 16 kuralı ile Stano Marĉek'in "Esperanto per Rekta Metodo" adlı kitabının neredeyse yarısı işlendi. Kursa Eğitim Koordinatörü Çağakan Aydın dahil toplam 11 kişi katıldı. Kurs fikri de sayın Çağakan Aydına aitti. Katılımcılara kurs sonunda sembolik sertifikalar dağıtıldı.

**Esperanto Kurso en Kozmos Yazılım Lernejo**

Post la prezento de Esperanto farita en la 27-a de decembro 2017 en Avcılar Kozmos Yazılım Lernejo ĉi foje en februaro en la sama lernejo ni organizis kvar-horan Eseranto-kurson. En la kurso la lern-materialoj estis la 16 reguloj de Esperanto kaj preskaŭ la duono de la libro de Stano Marĉek "Esperanto per Rekta Metodo". En la kurso partoprenis entute 11 personoj inkluzive de la lerneja kunordiganto Çağakan Aydın. La ideo pri tia kurso estis ankaŭ de Çağakan Aydın. Post la kurso atestiloj estis disdonitaj al la partoprenantoj.










## Granda sukceso por la E-kurso en Tel-Avivo (13/3/2018)

Karaj geamikoj,

Multaj opinias ke jam pasis la epoko de klasaj kursoj, kaj ke nuntempe kaj estonte oni lernas E-on chefe rete, per Duolingo, Lernu! au autodiakte. ELI tion spertis per multjara malpliigho de la lernantoj en ghiaj E-kursoj. Lastatempe ELI decidis reprovi klasan kurson, eble la lastan fojon. La estraro decidis investi senprecedencan bugheton por reklami la kurson kaj informadis, per strat-afishoj, Facebook,kaj per duonpagha anonco en la gazeto "Haarec".
Hodiau, dum la kurso-inauguro en la Tel-Aviva klubo, alvenis 36 personoj, kaj pliaj interesighantoj kiuj ne povis veni hodiau venos venontsemajne. La chambro estis plenplena (vidu foton).
La sperta instruisto, Doron Modan, estis surprizita kaj ekcitita pro tiu ne atendite granda nombro. La unua leciono tamen okazis en bona kaj trankvila etoso, kaj la lernantoj progresis rapide kaj interesighis pri la sekvo. Entute okazos 15 lecionoj ghis julio.

Amike,
**Amri**

שלום חברים,
פתיחת קורס האספרנטו היום במועדון בת"א היתה מוצלחת ביותר (ראו תמונה), בפרט הופתענו מכמות הנוכחים (36) ועוד כמה, שלא יכלו להגיע היום, יצטרפו לקורס בשבוע הבא. הגילים נעו בין 13-85. רובם הגיעו מן המודעה ב"הארץ", אשר לפני שבוע אושרה פה אחד ע"י ההנהלה למרות מחירה הגבוה. תודה לדורון שיזם את המודעה ולאמיר שהופקד על היחצנות ודאג

לשכנע את הפונים להגיע לקורס. אנשים נוספים הגיעו מכאלף מודעות רחוב ומהפירסום הממומן שהעליתי בדף הפייסבוק של אל"י (במשך שבוע ניצפה ע"י כ-5000 איש וגרף מעל 900 תגובות).

היה כיבוד קל על שולחן מרכזי שסביבבו ישבו כעשרה מהתלמידים, השארו ישבו על כסאות שהוצבו לאורך הקירות. בנוסף לדורון ואמיר היינו עוד חמישה חברים שעזרו בארגון ברישום (יואלה). בתחילת השעור הייתי אמור לברך בשם אל"י ולהזמין את הנוכחים לפעילויות האגודה, אך כנראה בשל הלחץ וההתרגשות דורון שכח. נקווה שתהינה עוד הזדמנויות בהמשך הקורס.

הצלחה כזו של קורס פרונטלי בעידן הקורסים המקוונים כמו LERNU או Duolingo היא מפתיעה. נותר לקוות שאחוז גבוה יסיימו את הקורס המתוכנן להמשך 15 שעורים עד יולי, ואולי אף יהפכו לפעילים.

עמרי



**Fondaĵo MONA** **(22/3/2018)**

UEA – UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
**en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko**
*Komisiono pri Agado en la landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko*

## Fondaĵo MONA

UEA ĵus starigis la **Fondaĵon MONA** por subteni la agadojn en la landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko, kiuj estas ĉiam pli rezultodonaj. Vidu, ekzemple, la retajn paĝojn **http://esperanto.net/ar/** en la araba.

Ni zorgas ankaŭ pri rektaj anoncoj pri Esperanto en arabaj Facebook-paĝoj, pri sendado de lernolibroj al dezirantoj, kaj pri multaj aliaj kampanjoj.

Zamenhof diris: al tia afero, kiel nia, la registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta. Pro tio ni mem, la simplaj kaj sinceraj esperantistoj, devas fari la laboron kaj subteni finance la laboron. Nia komisiono bezonas vian helpon, ankaŭ por ke gejunuloj el nia regiono ekaperu en la internacia movado. Pagmanieroj estas tiuj kutimaj al UEA, **https://uea.org/alighoj/pagmanieroj**, kun la indiko **“MONA”**.

Dankon!

للإسبرانتو ومتحدث متحدث ألف

## Komencis la 11-a MONA Kunveno en Marakeŝo (01/04/2018)

EKO 2018-09 AMO 45 sendita el Marakeŝo la 31an de marto.

**Riĉa komenca tago por la 11a MK kaj la 45a AMO**



Ekologia vilao liveris naturan ĉirkaŭaĵon por la **11a Mezorienta Kunveno**, kiu ekis en la lasta tago de marto rande de la maroka urbo **Marakeŝo**, kaj kadre de ĝi la **45a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO)**. Komence, la dojeno de la Mezorientaj Kunvenoj, s-ro **Renato Corsetti**, resumis la progreson aŭ ĝian mankon en deko da landoj tra la regiono de MONA – la Meza Oriento kaj Norda Afriko.

Pri la kvarjara historio de AMO-seminarioj rakontis **Stefan MacGill**; spite mirigan tutmondiĝon, 25 el la 45 seminarioj tamen okazis en Eŭropo. Rimarkinde, ene de la komencaj naŭ monatoj de la vivo de AMO, la programo jam atingis 4 el la 5 kontinentoj. Alvenis en tiu momento tri marokaj esperantistoj, do la kunvenintoj aŭdis raporton de **Mohammed Hakki** pri la nuna agado, kaj pluiris al manieroj kuraĝigi la agadon. Konkludoj: *ege helpos la fondo de du/tri urbaj kluboj, kiuj permesus kontaktadon enlande kaj ankaŭ translime; partoprenintoj el Hispanio kaj Francio indikis entuziasmon partopreni en tio*.

Post paŭzo, aperis la sola partoprenanto el subsahara Afriko, s-ro **Assanye Faye**, la prezidanto de la landa asocio en Senegalo, kiu atingis la kunvenon per obstakloza 4-taga busvojaĝo. Vojaĝo pli longa sed iom malpli defia estis tiu de 39 bravaj esperantistoj kiuj karavane odiseis trajne dum 12 tagoj de Sankta Peterburgo tra Moskvo, Irkutsk kaj Vladivostoko por partopreni la 102an UK en Seulo. Rakontis pri tio per bildoj **Tatjana Loskutova**, multvojaĝanta instruistino.

La posttagmeza programo riĉis je kulturo kaj historio. **Mirejo Grosjean** prezentis ilustritan promenon tra la labirintoj de limoj plej diversspecaj. Komence temis pri landlimoj, poste pri metaforaj kaj psikaj limoj, kiuj ofte dependas de kulturaj prijuĝoj aŭ antaŭjuĝoj. La posta prelego revenigis nin al la okcidenta Magrebo, kun skizo de ĝia komplika historio tra dudeko da jarcentoj. Fermis la sesion **Annie Grente** per paroliga ekzerco sekvata de defia tasko pri komprenado de filmo pri Leo Africanus, kun dek demandoj respondendaj ene de tri grupoj. La unuan tagon kronis **teatra spektaklo La kredito** interpretita de **Sasha Pilipovic** kaj **Georgo Handzlik**.

Pretigita en la 31a de marto 2018. **Stefan MacGill / Renato Corsetti**

## La 11-a MONA Kunveno en Marakeŝo daŭras (2/4/2018)

**La dua tago**

La matena programo estis dulingva, per du intervenoj. Tradukis el la franca la unuan Mirejo Grosjean kaj la duan Maria Butan. La unua estis prezentita de fakulo Hassan Aslafi (sur foto en la PDF) kaj temis pri la regiono Al-Andalus kaj substrekis la multegajn komercajn kaj kulturajn ligiĝojn inter la sudokcidenta parto de Eŭropo kaj la nordokcidenta parto de Afriko tra la jarcentoj. Tiu prezentaĵo venis al fino per pledo por finrealigo de nova projekto iel rekrei tiun siatempan ligadon pere de starigo de metafora kultura karavano, kiu konsistos el serio de eventoj de la franca Toulouse, tra la hispana Toledo, suden tra Maroko, Maŭritanio, Senegalo kaj fine Malio. Subtene al tio estu regiona Akademio. La prelegintο varme




invitis al esperantistoj partopreni en tiu ambicia projekto kaj aktive kontribui al ĝi.

La dua preleganto estis fakulo el marakeŝa



universitato, d-ro Aberrazzak Benchaabane. 11-aMONA-2Ĝi estis ilustrita kaj temis pri la fondo de Marakeŝo, en kiu la haveblo de adekvata akvoprovizo ludis gravegan rolon el kio ni venis al oazoj kaj poste al la ĉefa temo, la ĝardenoj de la urbo. Male al Eŭropaj kutimoj laŭ kiuj ĝardenoj ĉirkaŭas domojn, en Maroko kaj similaj landoj, pro klimataj konsideroj, la ĝardenoj troviĝas ene de la domoj, en belaj kortoj – kio konstateblas mem en la konstruaĵoj de la kunvenejo Villa Janna.

Post teorio, posttagmeze, sekvis praktiko – vizito al la urbo kaj ĝia granda placo kaj la apuda kovrita kaj labirinta bazaro.

**La tria tago**

Pli precize temis pri duona tago, kiu havis temon pri medicino kaj bonfarto. Komence prelegis Eduard Kusters pri la temo: kiujn medicinistojn ni bezonas en la nuna jarcento? Li montris, kiel la fako kontinue evoluas, sed de tempo al tempo trairas revolucion, ekzemple rilate al kompreno de la baza rolo de ĉeloj. Nunaj revolucioj temas pri la alpreno de avangardaj teknologioj ( ekz. mikroĉipoj) kaj individuigita medicino. La hipokrata ĵuro delonge influegas la konduton de kuracistoj kaj ni vidis, kiel ĝi evoluis tra la jardekoj kaj jarcentoj. Kiel ni raportis en lastatempa komuniko, ĝi ekzistas en Esperanto en la oficiala retejo de la monda kuracista asocio. La dua prelego temis multe pli pri filozofio – Maria Butan gvidis nin tra plej variaj konceptoj rilatantaj al la diversaj signifoj de la la verbo atendi. Ŝia temo: La atendo, kiel formo de ekzisto. Interalie, temis pri medicinaj atendoj. La lasta prezento vere temis pri trejnado plene fizika kaj aktiviga. Frank Lappe gvidis praktikan kurson pri unua helpo (sukurado), pri la restartigo de spirado en svenintaj aŭ kolapsintaj personoj. Deko da partoprenintoj povis elprovi la teknikojn. Per tiu plenumo de Aktivula Revivigo (ARO?) ni venis al la fino de la 11a Mezorienta Kunveno kaj la 45a seminario de AMO. Grava aspekto de la kunveno estis la partopreno de marokaj esperantistoj, kiuj povos formi la bazon por estonta evoluo de Esperanto en la regiono.

En la dimanĉo partoprenis seso da marokanoj, inter ili tiuj lernantaj la lingvon.



## Pri la 11-a Mezorienta Kunveno en Marakeŝo : Maroko estu nia venonta lando de Esperanto (18/4/2018)

Kiu ne vidis Marakeŝon, tiu povas nur bedaŭri. Tiu ne spertis la metion de la sorĉistoj de serpentoj, kiuj per siaj flutoj mirinde kvietigas siajn serpentojn. Certe la serpentoj ankaŭ kunlaboras kiel bonkondutaj laboristoj, kiuj lernis kaj aplikas la rutinon. Tio okazas en la centra placo, *Ĝama al-Fna*, kies nomo estas same mistera, kiel la agadoj tie okazantaj. Ne malproksime de tiu placo praktikis sian metion alia sorĉistino, **Annie Grente**, kiu sorĉis neesperantistajn gejunulojn kaj enmetis en iliajn kapojn la faktojn pri Esperanto. Ŝia metio estas pli malfacila, ĉar la junaj lernantoj estas tre pli vigle demandaj ol la rutinaj serpentoj. Tamen ŝi sukcesis.

Fakte partoprenis la kunvenon amaseto de junaj marokaj lernintoj aŭ lernantoj de Esperanto. Aldone al ili estis trideko da eŭropanoj kaj unu senegalano. Temis entute pri 17 landoj.

La prelegoj estis entute variaj. Kelkaj estis pure movadaj, kiel tiuj de **Renato Corsetti** pri *“La historio de la Mezorientaj Kunvenoj”* aŭ de **Stefan MacGill** pri *“La AMO-seminarioj”*. Kelkaj prelegoj estis kunligitaj kun Maroko kiel tiu de **Annie Grente** (kiu fakte estis filmo pri la vivo de la maroka verkisto *“Leo, la afrikano”*, verkinta en Italujo dum la renesanco) aŭ tiu

de **José Salguero** pri *“Juan Goytisolo, transkultureco transĝibraltara”*, aŭ tiu de **Tatjana Loskutova** pri *“Estinta karavano esperantista al la UK en Seulo kaj pri estonta al la kongreso en Lahti en 2019"*.

Sed la ĉefaj prelegoj okazis en la dimanĉa mateno kaj temis pri specife marokaj temoj. Unu estis de la loka profesoro **Abderrazzak Benchaabane**, kiu parolis pri *“La origino de Marakeŝo kaj pri ĝiaj multaj ĝardenoj, savenda havaĵo de la homaro“*. La dua prelego estis de **Hassan Aslafy**, loka fondinto de la Instituto de Andaluzioj en Maroko. Lia ideo estas esperantisma ĝis nun sen Esperanto. Temas pri *“Klopodo konigi kaj revivigi la kunlaboron inter civilizoj, kiu ekzistis en la mita epoko de Al-Andalus (regiono de Hispanujo kun multaj ligoj en Maroko kaj Norda Afriko)”*. Sekve de la prelego oni komencis kunlabori por formi esperantisman projekton en la pli granda projekto pri kunlaboro inter civilizoj.

Prelegis krome **Mireille Grosjean** pri *“Limoj”* kaj **Maria Butan** pri *“La atendo kiel formo de ekzisto“*. Sed ne mankis fakaj prelegoj, kiel tiuj de **Eduard Kusters**, *“Kiajn medicinistojn bezonas la nuna jarcento aŭ la ĵuro de Hipokrato en nia tempo”* kaj de **Frank Lappe**, *“Kurseto pri medicina unua helpo por nefakuloj“.*

La ekzistantaj tekstoj de la prelegoj estas troveblaj en la paĝaro:
**https://uea.org/vikio/Prelegoj_en_Marakesho**

Riĉigis la kunvenon spektaklo de **Saŝa Pilipoviĉ** kaj **Georgo Handzlik**, “La kredito“, kiu estis prezentita ankaŭ dum la UK en Nitra.

La ĝenerala impreso estas, ke Maroko estas preta por Esperanto kaj ke la ideo pri Esperanto tute ne renkontas kontraŭstarojn inter la junaj marokanoj. Espereble la ekzistantaj esperantistoj kaj la novaj lernantoj surprizos nin post unu-du jaroj.

**Renato Corsetti**
Kunordiganto de MONA

Marakeŝo...






prelegas **Mirejo Grosjean**... prelegas **José Salguero**...






“La Kredito” spektaklo de **Saŝa Pilipoviĉ** kaj **Georgo Handzlik**...





prelegas **Hassan Aslafy**... prelegas **Maria Butan**...





prelegas **Abderrazzak Benchaabane**.. prelegas **Eduard Kusters**...





junaj marokanoj... la kunveno...





## Sukcese okazis la 19-a Israela Kongreso en Akko (7/5/2018)

Sabate 5.5 finiĝis la tri-taga Israela Kongreso en Akko. Partoprenis pli ol 30 personoj. Oni ekskursis al Haifa (Bahaa Centro kaj japana muzeo Tikotin) kaj al Akko (ĉefe la kruckavaliraj fortikaĵoj). Aldone du fotoj.

Ĵaŭde kaj Vendrede okazis distraj vesperoj kun koncertoj de Ĵomart kaj Nataŝa, de Edgar (Sepa), kaj lokaj kontribuoj de Enrica, Tali kaj Mikaelo.

La kleriga posttagmeza programo havis kontribuojn de Tali, Jehoshua, Mikaelo, Gila kaj Luiza. La plena programo kal pliaj fotoj troviĝas en http://esperanto.org.il/ik.html.


La partoprenantoj ricevis la novan n-ron de Israela E-isto, kiu estos poŝte sendota al la ceteraj membroj kaj abonantoj.
Sekve komenciĝis la 7-taga postkongresa ekskurso al Jerusalem, Morta Maro, Eilat kaj Jordanio.

**Amri Wandel**
Prezidanto de ELI

שלום חברים,
בשבת הסתיים סופשבוע אספרנטו בעכו בהשתתפות יותר מ-30 חברים. טיילנו לחיפה (הגנים הבהאיים ומוזאון טיקוטין לאמנות יפנית) ובעכו (אולמות האבירים מהתקופה הצלבנית, מנהרת הטמלרים, חומת הים ומוזיאון אוצרות החומה). שתי תמונות מצורפות.
בתכנית האמנותית היו קונצרטים של הזמרים הידועים משבדיה, Jhomart kaj Natasha, הכנר הליטאי Edgar, וכן הופעות של אנריקה, טלי ומיכאלו.
בחלק ההרצאות אחה"צ תרמו טלי, יהושע, מיכאלו, גילה ולואיזה. התכנית המלאה ותמונות נוספות מופיעים באתר http://esperanto.org.il/ik.html.
המשתתפים קבלו את הגליון החדש של הבטאון.
החברים האחרים והמנויים בחו"ל יקבלו אותו בדואר.
ביום א יצא לדרך הטיול שאחרי הכינוס שימשך שבוע ויעבור בירושלים, ים המלח, אילת וירדן.
עמרי








ESPERANTO ÖĞRENİN

## En kolay dil?

**http://esperanto.net/ estis tradukita al la turka kaj tradukata al la araba kaj persa.**

Esperanto hızlı öğrenilebilen ve farklı kültürlere ait fikirlerin esnek şekilde ifade edilmesi için uyarlanabilen bir dildir.

İnsanlar genelde Esperanto dilini, diğer dilleri öğrendiklerinden çok daha hızlı öğrenebiliyorlar.

> Daha fazla okuyun

**Kiam ni havos ĝin en la kartvela, armena, hebrea kaj azera?**

**Kontaktu Emilio Cid, cid.emilio@gmail.com, se vi pretas traduki.**

UZU ESPERANTON

## Esperanto Arkadaşları

"Esperanto Arkadaşları" imkanı ile Esperanto'ya olan desteğinizi gösterebilir ve kendi dilinizde Esperanto hakkında düzenli olarak kısa bilgilendirmeler alabilirsiniz.

> Daha fazla okuyun

- Esperanto öğrenin
- Esperanto dilinde kitaplar
- Esperanto dilinde filmler
- Esperanto dilinde haberler
- Esperanto dilinde yayınlar
- Esperanto Arkadaşları

